

KARAVANOJ 1939

inter Arnhemo, Leeuwarden, (Nederlando)
kaj Risskov, Ry, (Danlando).



Antaŭ la Esperanto-domo, Arnhem, Nederlando.

A-Grupo : Leeuwarden—Risskov—Ry. Por nederlandanoj, belgoj kaj francoj. Vojaĝtempo: 26/7 — 10/8. Biletprezo: 16 guldenoj, (tien—reen); restadkostoĵ dumvoje: 10 guldenoj.

B-Grupo : Aarhus—Arnhemo—Leeuwarden. Por danoj, norvegoj kaj svedoj. Vojaĝtempo: 28/7—8/8. Biletprezo: 42 danaj kronoj, (tien—reen); restadkostoĵ dumvoje: 26 kronoj.

Aranĝantoj:

s-ro G. H. M. Kat, Spoorstr. 142,
Leeuwarden, Nederlando.

s-ro H. Grønberg, Rosenvej 8,
Risskov, Danlando.

La internacia Cseh-instituto de Esperanto,
Riouwstr. 172, den Haag, Nederlando.

DETALOJ.

En la menciitaj sumoj de la vojaĝkostoj estas enkalkulitaj: biletprezo, vojaĝimposto, pramkostoj en Germanujo, asekurkostoj, vojimposto en Danlando, restadkostoj dum la vojaĝo (tagmanĝoj, tranoktoj, k. t. p.).

Aliĝo: La A-anoj al s-ro G. H. M. Kat, Leeuwarden. (Ĝiro: 1460 16).

La B-anoj al s-ro H. Grønberg, Risskov. (Ĝiro: 353 64).

Enpago ĉe la aliĝo 10 g. aŭ 25 kr.. La restsumo 16 g. aŭ 43 kr. devos esti pagita antaŭ la 1-a de Julio. La prezoj estas laŭ la nuna monvaloro!

Aliĝu kiel eble plej baldaŭ! Vi ne nur grave plifaciligas la laboron de la aranĝantoj, sed ankaŭ tre malpligrandigas la eblecon, ke ni devas senluziigi vin pro manko je lokoj! La aranĝantoj havos rajton fini la akcepton de la aliĝoj, kiam la aŭtobuso estos plena. Okaze de aliĝoj de pli ol 35 en ĉiu grupo la aranĝantoj eventuale plenigos 2 aŭtobusojn 25—32 personajn por ĉiu grupo. La vojaĝoj okazos en tre komfortaj aŭtobusoj nederlandaj.

Personan pasporton prizorgu ĉiu partoprenanto mem.

En la komenco de Julio la A- kaj B-anoj ricevos definitivan programon. Petante pliajn informojn aldonu respondpoŝtmarkojn aŭ -kuponon.

La restado en la eksterlando. Plej rekomendinde estas por la A-anoj loĝi en la restadejoj Risskov—Ry, por la B-anoj en la Esperanto-domo en Arnhem. Detalaj prospektoj haveblaj ĉe la invitantoj. Se oni ne deziras loĝi tiel, oni rajtas mem prizorgi sian restadon en la fremda lando. Pasaĝeroj, kiuj dumvoje komencos aŭ finos la vojaĝon, ne havos malplialtigon de la vojaĝkostoj.

La A-grupo.

El Leeuwarden la 26/7 je la 7,00 de la hotelo »Sporzicht«. Alveno en Hamburgo je la 18,00. Tranokto. La 27/7 je la 7,00 el Hamburgo. Alveno en Risskov/Aarhus je la 18-a. Vespermanĝo. Restado en la agrikultura kaj mastrumada lernejo de Risskov de la 27/7 vespere ĝis la 1/8 posttagmeze. Prezo por plena pensio 5 tagojn de 18 ĝis 30 kr. = 7—12 guldenoj. (Litajoj ekstre 5 kr. = 2 g.). Detala prospekto ĉe s-ro Grønberg pri la internacia restado, kiu

samtempe okazos en Risskov/Aarhus.

La 1/8 posttagmeze de Aarhus al Ry (bileto: 2 kr.). Restado en la popola altlernejo, kie samtempe okazos la internacia restado, kiu en 1937 kunvenigis 160 Esperantistojn el 10 landoj kaj en 1938 kunvenigis 152 Esperantistojn el 12 landoj. Prezo por plena pensio 8 tagojn de 26 ĝis 40 kr. = $10\frac{1}{2}$ — $15\frac{1}{2}$ guldenoj. (Litajo ekstre 7 kr. = $2\frac{3}{4}$ g.) Detala prospekto ĉe s-ro Grønberg pri la internacia restado en Ry.

La 9/8 je la 7-a de Ry al Hamburgo, tranokto. La 10/8 je la 7-a de Hamburgo, alveno en Leeuwarden je la 18-a.

La vojaĝvojo de A: Leeuwarden—Buitenpost—Groningen—Nieuweschans, (la limo)—Leer—Oldenburg—Bremen—Hamburgo Rensburg—Flensburg—Krusaa (la limo)—Aabenraa—Vejle—Aarhus/Risskov. La returnvojo: Ry—Vejle k. t. p..

La B-grupo.

El Aarhus la 28/7 je la 7-a de la hotelo »Ansgar« ĉe la ĉefstacidomo. Alveno en Hamburgo je la 18,00. Tranokto. La 29/7 el Hamburgo je la 7-a. Alveno en Arnhem en la Esperanto-domo je la 18-a, vespermanĝo. (Alveno en Leeuwarden je la 22-a).

Restado en la Esperanto-domo ĝis la 5/8 matene. S-ro Andreo Cseh kaj s-ino Isbrücker prizorgos ekskursojn, eventuale perfektigan kurson, gvidotan de s-ro Cseh k. t. p.. Prezo por plena pensio 7 tagojn 14,40 guldenoj = 37,50 kr. (en 6 persona ĉambro), 18,25 guld. = 47,50 kr. (en 2-4 persona ĉ.), 22,10 guld. = 57,50 kr. (en 1 persona ĉ.).

La 5/8 je la 6,30 el Arnhem tra Doorn—Soest—Baarn—Hilversum—Amsterdamo—Alkmaar—la digego—alveno en Leeuwarden je la 18-a. Tranokto. Por tiuj preskaŭ 300 kmj oni pagu 5 kr. ekstre kaj mem kovru la restadkostojn dumvoje.

La 6/8 restado en Leeuwarden kaj ĉirkaŭaĵo sub gvidado de s-ro G. H. M. Kat, kiu prizorgas ĉion koncerne al tranokto kaj manĝado je modestaj prezoj. Tranoktoj, pagotaj de la B-anoj mem.

La 7/8 el Leeuwarden je la 7,00. Tagmanĝo kaj ordinaraj restadkostoj denove pagotaj per la enpagitaj 26 kr.. Alveno en Hamburgo je la 18,00. Tranokto.



Esperantistoj el
5 landoj antaŭ
la agrikultura
lernejo de
Risskov/Aarhus,
Julio, 1938.

La 8/8 je la 7,00 el Hamburgo. Alveno en Ry je la 18-a. Se oni deziras vespermanĝi en la popola altlernejo, partopreni en la adiaŭa vespera festo por la A-anoj kaj tranokti oni antaŭe anonc tion ĉe s-ro Grønborg. Same oni povos partopreni en la lastaj 2 tagoj de la internacia restado en Ry, kion ni tre rekomendas al la B-anoj. Antaŭe preparu tion!

La vojaĝvojo de B: Aarhus — Hamburgo — Bremen — Osna-brück — Reine — Bentheim (la limo) — Zutphen — Arnhemo — (Zwolle-Leeuwarden). La returnvojo: Arnhemo — Hilversum — Amsterdamo — Alkmaar — la digego — Leeuwarden — Groningen — Leer — Oldenburg — Bremen — Hamburgo — Flensburg — Skanderborg — Ry.